**PILO-PRESS**
Internacia
Informservo

Atentu!

Pola Radio
aktuale raportos
pri la UK en
Kopenhago

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg
Tel. (0911) 463649; 514269



N-ro 27/75 21 julio 1975
Aperas ĉiusemajne

## Inaŭguro kaj malfermo de la UK en Kopenhago

Kopenhago (pp) Laŭ la oficiala programo, kiun la kongresanoj ricevis antaŭ kelka tempo, la 60a Universala Kongreso de Esperanto en Kopenhago estos inaŭgurita kaj malfermita dimanĉe, la 27an de julio 1975 en la kongresejo "Falkoner Centret".

La inaŭguro okazos en ĉeesto de honoraj gastoj kaj diplomatoj de la 10 - 12 horo fare de la prezidanto de UEA, d-ro Humphrey Tonkin. Paroladon faros d-rino Szabó-Felsö, estrarano pri kongresoj kaj aranĝoj.

La malfermo de la kongreso kun salutoj de landaj asocioj okazos posttagmeze de la 14 - 15,3o horo. La malferman paroladon faros la prezidanto de UEA.

## Pola Radio raportos pri la UK

Varsovio(pp) En sia lastdimanĉa Esperanto-Ekspreso la redakcio de la Polaj Esperanto-elsendoj anoncis, ke ankaŭ ĉi-jare Varsovio rekte el Kopenhago raportos pri la UK en Kopenhago. Speciala reportero estos Jerzy Grum.

La elsendoj kun rektaj raportoj prikongresaj okazos:

dimanĉe, la 27an de julio, 22,30 horo (49 m, 200 m)

merkrede, la 30 an de julio

sabate, la 2an de aŭgusto

Aŭskultu kaj skribu al Pola Radio, Esperanto-Redakcio, P.OB. 46, PL-00-950 Varsovio, Pollando.

## Intereso por planlingvo-instruprogramo

Paderborn (pp) 14 instruistoj de filioj de la Goethe-Instituto el diversaj eŭropaj kaj ekstereŭropaj landoj vizitis sub gvido de sia kursestro H.W. Schäfer la Instituton por Kiberneta Pedagogiko en Paderborn kaj kun granda intereso tralaboris planlingvo-instruprogramon (Esperanto-programon) kun la instrusistemo Robbimat. Tiu programo estu enkondukita denove en la venonta lerneja jaro en minimume kvin elementlernejaj klasoj.

## Prezo-plialtigo ĉe SAT

Paris. (pp) SAT (Sennacieca Asocio Tutmonda) informas, ke pro la mondskala inflacio kaj la grava devaluto de la US-dolaro ili estonte fiksos la prezojn por SAT-eldonaĵoj en la valuto de la Franca Franko kaj ne plu laŭ la US-dolaro, kiel ĝis nun. La novaj prezoj estos pli altaj je ĉ. 20 % kompare kun la ĝisnunaj.

## Pilo-Press gratulas

al la internacia geedziĝa paro Antonia Bonomi, Verono, kaj Horst Spirat, Munkeno. La eklezia ceremonio okazis sabate, la 19an de julio, je la 15a horo, en Stephanskirche, Munkeno, plenumita de gimnazia profesoro pastro Ludwig Thalmeier en ĉeesto de esperantistoj.




## Esperanto en la praktiko

Firmao en Berlino publikigis en revuo "Die Berliner Wirtschaft" n-ro 12/13.6.75 anoncon kun teksto en diversaj lingvoj, i.a. ankaŭ en Esperanto: "Simpatia adreso por ricevi por tempo laborantan personaron."
Informis: Ulrich Hoffmann, Berlin

## Pliaj Esperanto-aranĝoj en FRG

Nordgermana Esperanto-Ligo invitas al ligo-tago en Soltau, la 27an kaj 28an de septembro 1975. Interesuloj sin turnu al Werner Heimlich, 304 Soltau, Fröbelstr. 4.

Sudokcident-Germana Esperanto-Ligo invitas al ligotago en belega regiono Löwensteiner Berge/Mainhardter Wald, en naturamika domo Steinknickle apud la vilaĝo Neuhütten, proksime de la aŭtostrata kruciĝo Weinsberg/Heilbronn. Atingebla ankaŭ per aŭtobuso.

La ligotago okazos la 20an kaj 21an de septembro 1975. Informojn donas Esperanto-Centro Württemberg, S-ino Helga Windisch, 744 Nürtingen, Dürerplatz 4

Nordbavara Esperanto-Ligo invitas siajn membrojn kaj ĉiujn esperantistojn el Bavario al Nürnberg por fondi Bavaran Esperanto-Ligon. La dato kaj kunvenejo estos ankoraŭ sciigita. Informojn donas: Esperanto Nürnberg, 85 Nürnberg 1, Postfach 2113.

Esperanto-Societo München invitas al "Tago de malferma pordo" la 6an kaj 7an de septembro 1975 kun ekspozicio en la kunvenejo "Ausstellungsraum am Holzkirchner Bahnhof, Eingang Bayerstr.

## Eŭropa Esperanto-Kongreso 1976

Eindhoven (pp) La Eŭropa Esperanto-Kongreso okazos de la 16a ĝis la 19a de aprilo 1976 (pasko) en Eindhoven, Nederlando sub la temo" La lingva interkompreniĝo en Eŭropo kaj ties problemoj". Kongresejo estos Philips' Kultura Centro (P.O.C.), Mathildelaan, Eindhoven. La kongreso estos komuna aranĝo de Belga Esperanto-Federacio, Germana Esperanto-Asocio kaj la nederlanda Esperanto-Asocio "LEEN".

El la provizora programo:

16.4.75: interkona vespero

17.4.75: (jar)kunvenoj de BEF, GEA, LEEN
diversaj fakkunsidoj
diservo en Esperanto
distra vespero kun balo

18.4.75: oficiala kunsido kun festparolado
laborkunsidoj (en grupoj)
"Instruadoj de lingvoj"
"Ekonomikaj aspektoj de la lingva diverseco"
"La sekvoj de lingva superregado"
plenkunsido
festvespero, kun la pola dancensemblo "Krakovia"

19.4.75: duontaga ekskurso tra pitoreska Brabanto

Ĝis la 31.12.75 la kongresa kotizo estas 20 n.gld. Kongresa adreso: Eŭropa Esperanto-Kongreso, Magnoliastraat 4, Eindhoven, NL

## Nova konkurso de Pola Radio

Varsovio (pp) Pola Radio anoncas novan konkurson. La aŭskultantoj estas petataj respondi al jenaj demandoj:

1) Ĉu vi uzis la servojn de la Polaj Fluglinioj LOT? Se jes - sur kiu trako kaj kiajn impresojn vi ricevis post tiu ĉi vojaĝo?
2) La aera transporto estis inaŭgurita en Pollando en la 1920 jaro kaj la Polaj Fluglinioj apartenas al la plej malnovaj fluglinioj en la mondo. En la jaro 1931 LOT estis kunfondinto de IATA. Kion signifas la vorto LOT en la pola lingvo?
3) Ĉu laŭ via opinio Pollando estas por la turistoj atrakcia lando, kompare kun la aliaj, se jes - pro kio? Ĉu la hotela bazo kaj aliaj servoj ofertataj de ORBIS kontentigas vin kaj kiagrade?
4) En kiom da landoj - kaj en kiuj, agas la informaj centrejoj de ORBIS kaj LOT?

La respondo al unu el la listigitaj demandoj jam rajtigas al la partopreno en la lotado de la premioj: Partopreno en 10taga ekskurso tra Pollando kaj valoraj objektaj premioj.

La respondojn bonvolu sendi laŭ la adreso: POLSKIE RADIO, PL-00-950 Warszawa 1, poŝtkesto 46, Pollando - en kovertoj signitaj per la vorto "konkurso", ĝis la 15-a de novembro 1975 (decidas la dato de la poŝta stampo).

La rezultoj estos anoncitaj en la disaŭdigoj de la Pola Radio la 15-an de decembro 1975.

++++++++++++++

## Pri la aktualeco de Radio Vieno

Pro la morto per aŭtomobila akcidento de d-ro Karl Schleinzer, la ĉefo de la Aŭstria Popolpartio, la sabatvespera Esperanto-elsendo de Radio Vieno estis anstataŭigita de funebra muziko, kiel germanlingve anoncis la parolisto. Tiu anstataŭigo iomete mirigis min, ĉar la aliaj programeroj okazis laŭ antaŭvidita maniero, des pli ĉar ĝuste je tiu sabato la aŭdkondiĉoj estis bonegaj.

Do, mi atendis ĝis dimanĉe matene, je la 6,45 horo. Kaj jen nova surprizo: Aŭdiĝis virina voĉo, ĝis nun ne aŭdita, kiu parolis pri la mortakcidentiĝo de d-ro Schleinzer. Tio fakte estis por mi ne kredebla afero: La akcidento okazis sabate posttagmeze kaj dimanĉe matene oni jam disaŭdigas pri tio komentarion en Esperanto. Vere Vieno ĉifoje certe superis Varsovion rilate al aktualeco. Post du tagoj letero de s-ro Emil Vokal, unu el la Esperanto-parolistoj el Vieno, donis klarigon: Pro la mortakcidento Radio Vieno ŝanĝis la semajnan komentarion. La radiostacio altelefonis s-ron Vokal je la 16a horo, sed li ne estis hejme, sed kune kun d-ro Karl Beckmann en kastelo Rothmühle ĉe Schwechat-Rannersdorf por rigardi la teatraĵon de Nestroj "Eulenspiegel" je oficiala invito de la urbkomunumo.

Sed feliĉe estis hejme la filino de Emil Vokal, s-ino Helga Farakuoye, ŝtate ekzamenita Esperanto-instruistino. Mag. Helga Farakuoye veturis do al la radiostacio, esperantigis la oficialan raporton pri la mortoakcidento kaj surparolis ĝin sur la bendon, kiun oni povis aŭdi dimanĉe matene. Tiele okazis en Vieno...

Cetere, s-ino Magister phil. Helga Farakuoye, nask. Vokal, parolos ankaŭ en la Esperanto-elsendoj el Vieno, sabate, la 2-an, kaj dimanĉe, la 3-an de aŭgusto. Ŝi anstataŭos sian patron, kiu dum tiu semajno feriumos "en la tiel nomita ĝiba mondo". Plia ceteraĵo: Ankaŭ la edzino de s-ro Vokal estas ŝtate ekzamenita pri Esperanto!

Li (vidu la bildon dekstre!) opinias:
Por Esperanto ĉiam estas varbsezono - ankaŭ dum la ferioj!

Li proponas:
Varbu per la varbilo
INTERNATIONALE SPRACHE ESPERANTO
en germana lingvo, 8 paĝa



Li opinias kaj proponas

Prezoj (inkl. afrankon!)

| | |
|---|---|
| 5 ekzempleroj | 2,-- GM |
| 10 " | 3,-- GM |
| 50 " | 12,-- GM |
| 100 " | 21,-- GM |

Aliaj germanlingvaj informiloj

Wir informieren, varbbroŝuro de Germana Esperanto-Junularo
12 paĝoj, ilustrita, DIN A 5

| | | | |
|---|---|---|---|
| 5 ekz. | 1,40 GM | 10 ekz. | 2,20 GM |
| 50 " | 9,50 GM | 100 " | 17,50 GM |

(inkl. afrankon!)

Serio Dokumentoj - Informoj

N-ro 1: Prof. D-ro Ivo Lapenna: Grundsätzliches über die Internationale Sprache(Esperanto) mit Anhang von Walter F.J. Walther, DIN A 5, 20 p., broŝ. 1,-- GM

N-ro 2: D-ro Werner Bormann: Die Einigung Europas und ihr Sprachenproblem, DIN A 5, 12 p., broŝ. 3,-- GM

N-ro 3: D-ro G.F. Makkink: Das Problem der Kommunikation in der Welt mit Anhang von Walter F.J. Walther DIN A 5, 20 p., broŝ. 2,50 GM

******************

## E ŭ r o p a   E s p e r a n t o - R e v u o

Novspeca gazeto en Esperanto por legantoj en la tuta mondo

Kun raportoj kaj informoj el la eŭropa kaj monda Esperanto-movado

Kun kulturaj felietonoj - Kun literaturaj kontribuaĵoj

Jare 8 numeroj kun entute 96 paĝoj

Abonkotizo por 1 jaro 16,-- GM por 1/2 jaro 8,-- GM

Ĵus aperas numero 4/1975 kun 16 paĝoj

Kun ampleksa parto "Kulturo - literaturo":
- Japanio - vidita de interne 2a parto
- Infanoj en Torento - provo de apreco
- Eĉ lavomaŝino estas nur homo, satiraĵo de Ephraim Kishon
- La aventuroj de Simplicius Simplicissimus, 11a ĉapitro
- Reykjavik - la kongresa urbo de 1977
- Julieto kaj Romeo, Verono kaj ĝia mito, hieraŭ samkiel hodiaŭ

Mendu ĉe Ludwig Pickel, D-85 Nürnberg 1, Postfach 2113
PSCHK Nürnberg 819 56-851